
# *Díaz-Canel elstarigas la validecon de Che Guevara*



**Che estas unu el la plej grandaj revoluciaj referencoj en Latin-Ameriko kaj aliaj latitudoj. Foto: Arkivo/Cubadebate**

Havano, okt 9 (RHK) La unua sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Kubo kaj prezidento de la Respubliko, Miguel Díaz-Canel, emfazis  la validecon de la ekzemplo de la argentin-kuba gerilo Ernesto Che Guevara (1928-1967), dum la 56-a datreveno de lia kapto kaj posta murdo en Bolivio.

En sia profilo ?e X (anta?e Tvitero), la prezidento konfirmis, ke Che vivas inter ni kaj inter ?iuj tiuj en la mondo, kiuj da?re batalas por pli bona ebla mondo.

En tiu sama socia reto, Díaz-Canel enmetis frazon de la historia gvidanto de la Kuba Revolucio, Fidel Castro Ruz (1926-2016), prononcita en la centra evento por la 20-a Datreveno de la falo en batalo de komandanto Guevara, la 8-an de  oktobro 1987.

> Se necesas paradigmo, se necesas modelo, se necesas imitinda ekzemplo por atingi tiajn altajn celojn, viroj kiel Che estas esencaj, viroj kaj virinoj kiuj imitas lin, kiuj estas kiel li, kiuj pensas kiel li."

Ernesto Che Guevara estis kaptita de la bolivia armeo la 8-an de oktobro 1967 kiam li partoprenis la batalon por la liberigo de tiu sudamerika nacio, kaj murdita horojn poste la? ordonoj de la Centra Sekreta Servo kaj la Usono-Registaro.

Malgra? la intenco de liaj ekzekutistoj silentigi lian ekzemplon, Che estas hodia?, kune kun Fidel, unu el la plej grandaj revoluciaj gvidantoj en Latin-Ameriko, kaj aliaj latitudoj.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/336099-diaz-canel-elstarigas-la-validecon-de-che-guevara

RADIO HABANA CUBA

**Radio Habana Cuba**